Oktobra Revolucio kaj la sekvoj

Moshe Lewin:
La Oktobra Revolucio rezistas al la historio

Hansgeorg Conert:
Bazoj kaj evoluo de la sovetsocio

Robert Steigerwald:
Socialismo kaj ŝtato - dek tezoj

Oktobra Revolucio kaj la sekvoj

Moshe Lewin:
La Oktobra Revolucio rezistas al la historio

Hansgeorg Conert:
Bazoj kaj evoluo de la sovetsocio

Robert Steigerwald:
Socialismo kaj ŝtato - dek tezoj

Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano

Monda Asembleo Socia (MAS)

Oktobra Revolucio kaj la sekvoj

Moshe Lewin:
La Oktobra Revolucio rezistas al la historio
Le Monde diplomatique en Esperanto, novembro 2007
Elfrancigitaj de Vilhelmo Lutermano

Hansgeorg Conert:
Bazoj kaj evoluo de la sovetsocio
Prelego aperinta en la germana revuo Z (*Zeitschrift für marxistische Erneuerung* [Revuo por marksisma noviĝo]), n-ro 75, septembro 2008, p. 160-169.
Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano

Robert Steigerwald:
Socialismo kaj ŝtato - dek tezoj
el Marxistische Blätter, n-ro 6, 2007, p. 49-53.
Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano

Vilhelmo Lutermano [komp.]
Oktobra Revolucio kaj la sekvoj
Moshe Lewin:
La Oktobra Revolucio rezistas al la historio;
Hansgeorg Conert:
Bazoj kaj evoluo de la sovetsocio
Robert Steigerwald:
Socialismo kaj ŝtato – dek tezoj

Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano
© Monda Asembleo Socia (MAS), 2009
Ĉiuj rajtoj rezervitaj por la Esperanta versio.
ISBN 978-2-918300-07-6

Enhavo

Moshe Lewin: Neatenditaj heredantoj de la car-reĝimo - La Oktobra Revolucio 1917 rezistas al la historio.....7
„Elĉerpita” registaro.....9
Diagnoza eraro.....15
Hansgeorg Conert: Bazoj kaj evoluo de la sovetsocio.....20
Robert Steigerwald : Socialismo kaj ŝtato - dek tezoj.....35

Moshe Lewin: Neatenditaj heredantoj de la car-reĝimo - La Oktobra Revolucio 1917 rezistas al la historio

"La krimoj de la komunismo", titolas la speciala numero de la revuo Historia. *Naŭdek jarojn post la sturmo de la Vintropalaco estas kvazaŭ la socia eksperimento tiam lanĉita reduktiĝus al stalinismo kaj gulago. Malproksime de tiu unuflanka vido, la historiisto Moshe Lewin relokas la sovetan komunismon en la historion de Rusio kaj pensas pri la instruoj tireblaj el ĝi. Pri la impeto kaj kadukiĝo de la politikaj sistemoj ĝenerale, kaj aparte pri tiuj kiuj deklaras sin socialismaj.*

Oktobro 1917[1] stampis la historion de la 20-a jarcento. Ĝi vekis multajn polemikojn, pravigojn kaj ideologiajn proklamojn, kliŝojn kaj definitivajn kondamnojn kiuj, por multaj observantoj, ne distingeblas disde la realo. La daŭrigo de tiuj reprezentiĝoj ankritaj en la fonda evento, la sturmo de la Vintra Palaco, kontribuas maski la realon en la menso de multaj homoj. Tiel, en 1917, kio superregis, estis la renverso de ĉiuj gvidaj institucioj (armeo, polico, ŝtataparato, la ekonomiaj rondoj, la opinioj kaj la percepto de la politika vivo) kaj ĥaoso kiu ege gravis por la decidoj de la bolŝevistoj.

Plurfoje cetere, tio kio okazas sur la soveta scenejo ne havas rilatojn kun la dekoracio kaj la diskursoj, kio donas surprizple-

1 La konkero de la potenco (simboligitaj de la sturmo de la Vintropalaco de Petrogrado [Sankt-Peterburgo], kie rezidis la provizora registaro) okazis en la nokto de la 6-a al 7-a de novembro 1917 laŭ la gregora kalendaro kiu estis adoptita de Rusio kelkajn monatojn poste. Ĝis tiam ĝi uzis la julianan kalendaron, en kiu la bolŝevista revolucio okazis en oktobro.

nan historion, ĉar ĝia kadro estas kun krizoj, kie la diserigaj faktoroj agis kun aparta perforto kaj kie la restrukturaj faktoroj alprenis surprizajn formojn.

Ĉia sistemo, nuna aŭ pasinta, analizendas el la vidpunkto de siaj naturaj energioj, de ĝia kapablo aŭ ne reformiĝi, kaj do trovi novan viglecon forlasante danĝeran orientiĝon. La ideologioj estas ofte blindigaj, ĉar ili praktikas la memcelebradon: ili kondukas la homajn estulojn forgesi ke la reĝimo en kiu ili vivas kaj kiun ili konsideras pli dezirinda komencis funkcii laŭ aliaj reguloj, sub la efiko de dissolvaj ekonomiaj kaj sociaj faktoroj kapablaj senigi ĝin je ĝia substanco kaj lasi de ĝi nur la ŝajnon. Tia situacio kompareblas kun teatro en kiu la dekoracio kaj la ago havas nenion komunan. La dekoracio estas tiu de alia teatraĵo, apartenanta al alia epoko; la ludata ago kondukas tute aliloken.

La krizoj kaj la diseriĝaj fazoj plene partoprenas en la evoluo de la historio. Ofte ili stampas la finon de erao, de sistemo. En iuj kazoj, se certaj fortoj (internaj aŭ eksteraj) ekzistas, malfermiĝas nova paĝo, kelkfoje nomata „revolucio". Notindas ke granda nombro da aŭtoroj parolas pri la revolucio „efektivigita" de la bolŝevistoj, kio ofte subkomprenigas ke ili „kulpas" pri ĝi.

Tiu interpreto de la eventoj estas tutsimple lamentinda. Ĝi montras totalan nescion de kio okazis en septembro kaj oktobro 1917, kiam jam nenio funkciis en Rusio, la paralizo de la potenco estis totala kaj en la tuta lando estis okazontaj grandskalaj kamparanaj ribeloj, interna milito, mallonge, ĝenerala ĥaoso. La revolucio (ĉar estis okazonta ja tio) estis nur respondo al tiu

kreskanta ĥaoso kaj al la perspektivo de simpla malapero de Rusio kiel nacia ŝtato.

„Elĉerpita" registaro

MALLONGE, ne la revolucio estigis la krizon: sed profundega krizo estis solvita de la revolucio gvidata de la bolŝevistoj, post kiam la aliaj fortoj, kiuj malespere provis regi la situacion, nur profundigis ĝin. Kontraste al certaj kliŝoj, en tiu momento la oficiala politika reĝimo, simboligita de la provizora registaro starigita post la falo de la carismo, en februaro 1917, estas nur dekoracio - nenio okazas. Ĝi estas „elĉerpita" kaj finita. Ne ekzistas ŝtatpotenco, nur ties ŝajno.

La ideo ke la bolŝevistoj „prenis la potencon" (de iu) ignoras komplete la realon: neniu havis ian ajn potencon, de kiu li povintus esti forigita. La bolŝevistoj ne nur ne prenas la potencon de iu, sed ili devas krei ĝin. Kiel poste skribis Vladimir Iljiĉ Uljanov Lenin, komence la bolŝevistoj havis nenion, krom sloganojn kiel „socialismo", „revolucio", abolo de la privilegioj kaj titoloj (nobelaro, burokrataro). La ŝlosila elemento de ilia sukceso, ni ne forgesu tion, estas la alvoko al la kamparanoj ke ili alproprigu la teron kiun ili kultivas kaj kiun ili konsideru sia. Tia dispono povintus savi la provizoran registaron se ĝi estus ĝin adoptinta, sed tiu postkuris la reprezentantojn de la proprietuloj: ĝi estis konvinkita ke la socialismo ne eblas - erara konkludo el ĝusta konstato.

Certe, la socialismo estis neebla, sed la gvidantoj de la provizora registaro rifuzis kompreni ke burĝa demokratia revolucio estis tute same tia. Jen la dramo de la politikaj partioj enga-

ĝitaj en la koalicioj inter februaro kaj novembro 1917: la ĥaoso etendiĝis kaj ili sukcesis nek kompreni ĝin nek bridi ĝin. Tiuj kiuj ekagas kaj fine venkas, prenas sur sin konsiderindajn riskojn, ne ĉar la Blankuloj (la monarĥistoj) grupigas jam siajn fortojn (kontraŭ la provizora registaro), sed pro la severeco de la krizo kaj la ondego kaŭzita de kompleta renversiĝo de la socio.

La bolŝevistoj estis do venkontaj, sed la venka partio estis en la potenco, komence, nur laŭnome, kvazaŭ simpla ŝildo. Ĝi ne povis teni en la fajrego de la eventoj, fronte al amasa alfluo de novaj membroj kaj la enorma premo de la plenumotaj taskoj, al kiuj nek ĝia antaŭrevolucia sperto nek ĝia karaktero estis ĝin preparintaj. Tiu partio ja ekzistis, kun reala interna demokratio, sed ĝi ne transvivis la tumulton, ne pro la interna milito (la bolŝevistoj finis ĝin venke), sed pro la premo de la sennombraj taskoj de administrado kaj de konstruado de ŝtato. En 1921, ĝuste antaŭ ol lanĉi la Novan Ekonomian Politikon (NEP), paŭza periodo post la „militkomunismo”, Lenino komprenas ke li devas konstrui novan partion: la bolŝevismo, kiu ankoraŭ montris sian kapablon dum la interna milito, estas jam nur fantomo.

Kun la fino de la interna milito (1921), la agado ŝanĝiĝas, eĉ se la dekoracio restas. La bolŝevistoj estas instalitaj en la potenco, sed multaj libroj pri la temo ne komprenas ke daŭre paroli pri „bolŝevistoj” signifas elvoki fantomon. La ludata peco, kaj tio povus esti ĝia titolo, estas la transformo de revolucia partio en klason de administrantoj.

Pli precize, du scenaroj alfrontiĝas en tiu dekoracio: difini la

spiriton naskitan de la revolucio, jen la problemo. Mi montris tion en *La soveta jarcento*[2], la alfrontiĝo inter Lenino kaj Jozefo Stalino estas kolizio de du politikaj programoj profunde antagonismaj, kaj ne inter du frakcioj sine de la sama partio. Se ni pensas pri la malapero de la aŭtenta bolŝevismo, la batalo okazas inter Lenino engaĝita en provo difini programon por nova politika tendaro, kiu estu adaptita al la komplete nova situacio estiĝinta de la interna milito, kaj Stalino formulanta sian propran koncepton de kio devas esti la ŝtato (kun li ĉekape), koncepto kiu baziĝas sur premisoj kiuj havas nenion por fari kun la bolŝevismo kaj kiu esprimas ĉefe lian vizion de persona potenco vidata kiel celo per si mem, nutrata de lia percepto de la rusa historio: kion signifis tio en la pasinteco kaj implicas por la nuno. La programoj kiuj rekte alfrontiĝas en 1922-1923, unuavice kun la debato pri la formado de la USSR,[3] ekskludas sin reciproke kaj ne provas kaŝi sian antagonisman karakteron. Tiu batalo finiĝas kun la malsano kaj poste la morto de Lenino en januaro 1924.

La stalinismo[4] estas bona ekzemplo por tio kion povas signifi la maljuniĝo de sistemo kaj levas eĉ la demandon ĉu, en tiu

2 France: *Le siècle soviétique*.

3 En la debato pri la estonta USSR kontraŭstaras Lenino (subtenata de la precipaj gvidantoj, de Zinovjev ĝis Trocko), partizano de „federacio” kiu donas grandan nombron da rajtoj al la nerusaj respublikoj (nur pri diplomatio kaj militaferoj kompetentas la centra potenco) kaj Stalino kiu defendas la ideon de koncentrado de la potencoj en la centro, dum la nerusaj respublikoj havos nur fasadan aŭtonomecon. Pro tio la akuzo lanĉita de Lenino kontraŭ Stalino esti la daŭriganto de grandrusa ŝovinismo. Pri tiu punkto vd *Le Siècle soviétique*, p. 35-51.

4 Mi komprenas sub stalinismo nur la periodon dum kiu Stalino estis en la potenco.

kazo, ĝia longa vivo ne estis „genetike antaŭdeterminita" de ĝia nekapablo reformiĝi: ĉar la stalinismo ne povis esti io alia ol kio ĝi estis kaj ĉar ĝi estis kondamnita resti, sistemo alte sekureca konstruita por kaj ĉirkaŭ aŭtokrato, kaj pro tio ne reformebla. Tio estis ankaŭ la kaŭzo pro kiu la stalinismo, pro la efiko de la ŝanĝoj okazantaj en la socio kiel sekvo de la ŝtata politiko mem, povis nur fosi sian propran tombon.

Kiam oni pristudas Stalinon, oni komprenas ke lia konstanta batalo kontraŭ la revolucia pasinteco venis de la fakto ke tiu pasinteco donis al li nenian sekurecon - li ne sekvis ĝiajn instruojn, li estis eĉ malamika al ĝi, kiel montris lia batalo por grandrusa ŝovinisma Sovetunio. Lia serĉado de pasinteco kiu plej taŭgu por li, do ne estas surpriza, ne pli la fakto ke li kunigis la heredaĵon de la aŭtokrateco por difini la grandajn liniojn de tio kio devos esti la Unio de la Socialismaj Sovet-Respublikoj. Nur la carismo donis al li la legitimecon kiun li serĉis, ĉar la potenco sub la caro okazis sen perantoj, prenita kaj ricevita rekte de Dio.

Pli surprize, male, estis lia sistema pruntado de la ideologiaj strukturoj de la cara Ruslando dum la dua mondmilito kaj post la milito. Tio malkaŝas ke Stalino spitis la fakton, tamen bone pruvitan, ke tiu reĝimo estis elĉerpinta ĉiujn siajn eblecojn en la momento de la unua mondmilito. La ĉefo de la Kremlo ŝajnis ne scii ke la modelo kiun li volis adopti estis plena de krizoj kaj mortis pro ili - sen eĉ paroli pri lia preferata modelo, Ivano la Terura[5], kiu dronigis la landon en malluman periodon de tu-

5 Ivano la 4-a (1547-1584), nomata Ivano la Terura, unua moskva grandprinco kiu estis oficiale kronita caro, estas konsiderata de iuj kiel unu el la homoj kiuj plej kontribuis al la grandeco de Rusio. Li restis en la his-

multoj.

La stalina reĝimo estas spertonta similan sorton en la sama momento, en kiu ĝi paradokse aperas, por la tuta mondo, en la pinto de sia gloro, sekve al la venkego super la naziismo. La sistemo tiam ĉesas funkcii kaj eniras fazon de malfortiĝo, dum ĝia ĉefo, gvidanto de venka superpotenco, ĝuas maksimuman prestiĝon. Sed ĝi estas superpotenco kun argilaj piedoj, kaj ĉiuj kompanoj de Stalino scias tion.

Tiu punkto meritas detaligon. La carisma reĝimo ne havis savonton, nenian legitiman kaj kapablan heredanton. La stalina reĝimo siavice havis tian, en la grupo de la proksimaj kompanoj de Stalino, kiuj senpacience atendis la momenton en kiu ili povus eklabori kaj revigligi sistemon kun absurdaj misfunkcioj. En la momento en kiu tiu denuncas la „*kosmopolitojn*” kiuj „*adorkliniĝas antaŭ la Okcidento*”, kiam la altaj oficistoj devas vesti sin per uniformo kaj kiam iliaj titoloj venas rekte de la „rangotabelo” starigita de Petro la Granda, kiam la judaj intelektuloj estas likvidataj, kiam altaj respondeculoj estas murdataj (la Leningrada Afero[6]) kaj kiam komencas la proceso de la Blankkiteloj[7], estis malfacile antaŭvidi ke la USSR havis anko-

torio kiel sanga tirano pro sia krueleco (kaj sendube sia frenezo).

6 En 1950 ĉiuj eksaj gvidantoj de la Partio kaj de la administracio de Leningrado estas ekzekutitaj. La precipa akuzito estas Aleksej Kuznecov kiun Stalino estis nomuminta sekretario pri la kadruloj de la partio. Kiel tia, Kuznecov ŝajnis esti eventuala posteulo de Stalino. La vica ĉefministro kaj gvidanto de la *Gosplan*, Nikolaj Voznesenski, estas inter la viktimoj.

7 Pri la subpremo de la sovetiaj judoj, kiuj disvolviĝas post la dua mondmilito kaj kiu kulminas en 1953 kun la akuzo pri komploto, kontraŭ la (judaj) kuracistoj de Stalino, vd Laurent Rucker, *Staline, Israël et les juifs [Stalino, Israelo kaj la judoj]*, Presses universitaires de France, Pa-

raŭ antaŭ si periodon de impresa disvolviĝo.

Fakte, parto de la proksimaj kompanoj de Stalino, supozataj esti ĝisostaj stalinistoj (iuj estis efektive tiaj!) ekagas por elimini la fuŝaĵojn kaŭzitajn de Stalino. Ili faras tion sufiĉe rapide post lia morto en marto 1953, kaj radikale, per serio de gravaj reformoj kiuj konkretiĝis en la 20-a Kongreso de la Soveta Komunista Partio de 1956.

Plurfoje multaj personoj, kies malamo kontraŭ la USSR respondas al psiĥa bezono kiun mi penas kompreni, estis ŝokitaj kiam mi asertas ke la forigo de la Gulago estis unu el la unuaj disponoj faritaj de la poststalina direkcio. Ŝajnas al mi efektive decide distingi la Gulagon sub Stalino, kiel ekonomian-industrian komplekson, disde la MVD, de la sistemo de la koncentrejoj profunde reformita, kiu restis en la periodo post la morto de Stalino.[8]

Tiurilate oni povas demandi sin pri tiu fiksiĝo de la Okcidento sur la Gulago, pri la kialoj pro kiuj ĝi akceptis sen la plej eta rezervo la diskurson kiu metas egaleco-signon inter la Gulago kaj la soveta reĝimo, asimilita al la absoluta malbono. Ĝi salutis la reprezentanton de tiu tezo, Aleksandr Solĵenicin, kiel profeton. Nu, tiu defendis paseisman ideologion. Li malamis la socialdemokratojn grupitajn ĉirkaŭ la revuo *Novij Mir* kaj ties ĉefredaktiston Aleksandr Tvardovski. Li estis ĝisosta malamiko de la okcidenta demokratio. Ĉu eble tiu predikanto de mezepoka ortodokseco estis necesa por plenigi la ideologian malplenon de la malvarma milito?

rizo, 2001.

8 Vd *Le Siècle soviétique*, v. c., p. 151-166 kaj 204-222.

La soveta sistemo spertis ankoraŭ alian ciklon de kadukiĝo kun la periodo nomata „stagnado”, kiu komencas fine de la 1960-aj jaroj. Tiu periodo metas novan demandon, tiun de la kontraŭdiraj orientiĝoj sine de la sistemo, produktitaj de la apero de esencaj vektoroj de la ŝanĝo. La urbanizado, la grandskala modernigo de la lando estis fariĝintaj nekontesteblaj fenomenoj. Eĉ se la parto de la loĝantaro vivanta en la kamparo estis grava, nun la plimulto de la civitanoj loĝis en urboj, estis riceviinta edukadon kaj kutimis uzi la novajn teĥnikojn. La statuso de la virinoj spertis ankaŭ gravajn pliboniĝojn. Tiuj konsiderindaj transformiĝoj de la socio havis ankaŭ malrektajn efikojn sur la kampara loĝantaro, kiu, sen iri al la urboj, adoptis ties ĉefajn trajtojn.

Tiu rapida moviĝo naskis relative novan urban socion. Tiu urbaniĝo estis „juna”, dum la burokrateca ŝtato, simila al la cara sistemo, estis „maljuna”. Malgraŭ sia relativa juneco, la sistemo starigita post 1917 estis antaŭtempe maljuniĝinta.

Diagnoza eraro

TIO KONDUKAS NIN al la demando de la signoj de vigleco. La soveta ŝtato estas totale burokrateca kaj praktikas rigoran centrismon kun kontrolado dealte. Tamen, la potenco ĉe la pinto fariĝis komplete dependa de la burokrata maŝino, ĉefe tiu de la ministrejoj, kiu sukcesis trudi al la pinto marĉandi kun ĝi; iom post iom ĝi faris tiel ke tiu marĉandado turniĝis al ĝia favoro, kaj fine eĉ ĉesis sekvi la ordonojn. Tiu burokrata maŝino transformiĝis al monstro movata de sia propra logiko kaj kiu trenis la sistemon abismen.

La fundamenta punkto estas ke la centro perdis la potencon

kaj sian kapablon regi la eventojn. Ĝi montriĝis nekapabla fari kion la sistemo devis fari se ĝi ne volis malaperi, nome reformiĝi, adaptiĝi al la ŝanĝoj, ŝanĝi sian strategion kaj politikan orientiĝon, gajni novajn aliancanojn kaj batali kontraŭ la ĉefaj obstakloj. La sistemo senpolitikiĝis kaj ne povis trudi ion ajn al iu ajn. Simbole, la lando estis gvidata de Leonid Breĵnev, ĝenerala sekretario agonia, se ne jam morta.

La senpolitikiĝo, en la senco de la perdo de ĉia kapablo fari politikon, ne estas nur simptomo: ĝi signifas ke oni atingis punkton de nereveno. Ĝi konfirmas la ideon ke jam ne ekzistis „gvidanta partio" en la senco de organizaĵo kapabla disvolvi konsekvencan politikan agadon. Tia partio estus evitinta la bedaŭrindan fakton dependi de tiu amaso da altaj respondeculoj de plej diversaj administracioj, sole zorgantaj pri siaj propraj interesoj kaj kiuj estris gigantan armeon de gvidantoj zorgantaj pri „privatigo" de la entreprenoj kiujn ili devis administri.

Analizistoj, planistoj, verkistoj publikigis, avertis, antaŭdiris la katastrofon, sed la pinto estis paralizita. En tiu epoko (de la fino de la 1960-aj jaroj ĝis la 1980-aj jaroj), ĉia moviĝo, en kiu ajn direkto, estis konsiderata kiel fatala. La legendo, larĝe disvastiĝinta, laŭ kiu Sovetunio disfalis pro la neelteneblaj elspezoj kaŭzitaj de la malvarma milito kaj de la vetarmado estas nur, por diri tion kun reteniĝemo, eraro de diagnozo. La interludo de Juri Andropov (ĝenerala sekretario de la Partio inter 1982 kaj 1984) estas tre interesa, sed ĝi estis tro mallonga por esti konvinka. Tiu mallonga periodo prezentis elementojn kiuj povintus kontribui al la repolitikigo de la sistemo kaj mobilizi ĝin por urĝaj reformoj en la ekonomia kaj politika kampo. La suk-

ces-kondiĉoj ekzistis.

La fiasko de la soveta sistemo estas riĉa je instruoj pri la sistemoj, iliaj transformiĝoj, iliaj fanfaronadoj, ilia maljuniĝo, iliaj krizoj. Paroli pri maljuniĝo signifas starigi la tezon ke sistemo pasas tra diversaj etapoj dum kiuj reĝimo montras konsiderindan viglecon por poste sperti stagnajn periodojn kaj kadukiĝon, sekvatajn de novaj viglaj fazoj. Tiuj diversaj momentoj rigardeblas kiel eroj de unu sama ĉeno tiom longe kiom la koncerna sistemo identigeblas ankoraŭ kiel tia kaj dum ĝi ne estas nekuracebla.

Tiuj fenomenoj kaj iliaj efikoj kompreneblas pli bone se oni komparas la USSR kaj Ĉinion. Senkonteste oni povas iel kompari la du reĝimojn: tiu de Mao Zedong kiel tiu de Stalino spertis „grandajn saltojn antaŭen", sekvatajn en ambaŭ landoj de stagnaj kaj malfortiĝaj periodoj, poste de formoj de revigliĝo. Tamen la du reĝimoj spertis tre malsamajn evoluojn.

La soveta sistemo, kvankam multe pli evoluinta, dronis en fazo de stagnado kaj montriĝis nekapabla fari signifajn reformojn kiuj tamen nepris kaj por kiuj la lando estis preta. Male, la ĉina sistemo (de la sama tipo de politika sistemo kiel la soveta) sciis lanĉi impresajn reformojn dum ĝi estis ne tre malsama ol la reĝimo de Stalino; ĝi estis multe pli subprema kaj kontrolis pli severe la socion ol la soveta reĝimo en la sama epoko. Tio montras ke la problemo ne estas tiu de la tiel misfamigataj „komunistaj reĝimoj", sed ke ĝi dependas de la kapabloj de la direkcioj, en certaj etapoj, transformiĝi.

La karaktero socialisma, aŭ ĉiukaze emancipiga, de la Oktobra Revolucio estas eksterduba. Aliflanke, ĉu eblas paroli pri soveta ŝtato socialisma? Malfacilas subteni tian tezon. La fakto

ke ĝi mem nomis sin „socialista”, kun „komunista” partio, havas nur la trafecon de la oficialaj sloganoj kaj afiŝoj. La socialismo estas formo de demokratio kiu preterpasas ĉiujn formojn kiuj povas ekzisti en la kapitalisma mondo. Tio diras al ni nenion pri la ekonomia sistemo kiun tia demokratio povus deziri starigi, ni diru simple ke tiu sistemo devas esti inter la manoj de la socio, sen kapitalistoj nek burokratoj.

Pensi pri tiu ŝtato, kiu proklamis sin forte kaj laŭte socialisma kaj gvidata de komunista partio, povas ebligi proponi elementojn de respondo. Tiuj proklamadoj (laŭ la mitoj kiujn aliaj ŝtatoj provas komprenigi al la mondo) estis nemalhaveblaj por legitimi la sistemon antaŭ ĝia propra popolo kaj antaŭ la internacia opinio. Sed tiuj deklaroj ne eltenis la komparon kun la realo, ne nur ekster Rusio, sed en Rusio mem, kie, post Stalino, ekzistis urba socio, disvolvita, edukita, kun multegaj kadruloj spertaj en ĉiuj kampoj, inkluzive pri mastrumado de publikaj aferoj; tiu socio ne povis preni la diskurson pri „socialismo” por realo.

La dramo estas ke la pezo de la historio ne estis kaj ne povis esti eliminita. La profunde instalita burokrata faŭno, kiu floris en la carisma Rusio, eble malaperis per siaj individuoj, sed la fenomeno tutsimple refloris sub formoj adaptitaj al la sovetaj realecoj.

Lamenti servas al nenio. La soveta ŝtato postulas seriozan historian studadon. Unu afero estas ĉiukaze klara, ĝi ne estis socialisma. Aliflanke, tiuj, kiuj faris la Oktobron, jes. La ideoj, kiujn ili kredis kaj kiujn ili praktikis, restas hodiaŭ tiel viglaj kiel ili estis tiam, kiam ili engaĝiĝis, meze de la krakado de

disfalanta lando kaj nacio, kaj refaris Rusion historia aganto.

Moshe LEWIN estas profesoro, aŭtoro nome de Le Siècle soviétique *[La soveta jarcento], Fayard-Le Monde diplomatique, Parizo, 2003.*

Hansgeorg Conert: Bazoj kaj evoluo de la sovetsocio

*Prelego aperinta en la germana revuo Z (*Zeitschrift für marxistische Erneuerung *[Revuo por marksisma noviĝo]), kun enkonduko fare de la redaktejo de Z, n-ro 75, septembro 2008, p. 160-169. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano*

La ĉi tie publikigitan prelegon faris la marksisma sociscienciisto kaj altlerneja instruisto ĉe la universitato Bremeno Hansgeorg Conert dum la kolokvo „Ĉu de la kadukiĝo de Sovetunio al tutmonda superregado de Usono?" okaze de lia 70-jariĝo en aprilo 2003 en la internula popoluniversitato Heimvolkshochschule Hustedt. Ni publikigas ĉi tie la kontribuaĵon laŭ instigo de Hubert Zaremba (Gotingo), al kiu ni dankas ankaŭ la disponigon de la manuskripto. De Hansgeorg Conert, kiu apartenis al la dekomencaj aŭtoroj de nia revuo, aperis tuta vico da kontribuaĵoj en Z, en kiuj li aparte diskutis pri la analizo de la sovetia socialismo, pri la kapitalisma transformado de Rusio kaj pri nuntempa kapitalismo-analizo kaj -kritiko[1]

1 Nome: Kaŭzoj de la manko de efikeco de la sovetia ekonomio kaj la malsukceso de la perestrojko, Z 12, dec. 1992, p. 86sj; Pri la aktualeco de la Marksa kapitalismokritiko, Z 31, sept. 1997, p. 136sj; Emancipiĝinta socio kaj bezonorientita produktadmaniero. Konturoj de realutopia koncepto, Z 35, sept. 1998, p. 184sj; La dorna vojo de Rusio al kapitalismo, Z 40, dec. 1999, p. 134sj; Antaŭkondiĉoj kaj kaŭzoj de la financkrizo de Rusio 1998, Z 42, junio 2000, p. 54sv; Kapitalisma evoluo kaj politika-emancipiĝa agado hodiaŭ, Z 45, marto 2001, p. 7sj; La rusa-sovetia socialismo. Evoluo kaj fiasko, Z 48, dec. 2001, p. 195sj; GDR kaj tutmondigo, Z 49, marto 2002, p. 213sj; Ĉu nova „manifesto" aŭ „mistifiko"? „Empire" de Michael Hardt kaj Antonio Negri, en Z 50, junio 2002, p. 143sj; La milito de Usono kontraŭ la „Internacia terorismo", Z 52, dec. 2002, p. 182sj; Usono kiel kontraŭpotenco, ZT 55, sept.

1.

La abrupta fino de la ŝtatsocialisma ordo en Sovetunio signifas profundan tranĉon en la moderna mondhistorio. Por la granda plimulto de la homoj en la tuta mondo tiu sensacia okazaĵo venis surprize, sed ankaŭ por granda parto de la politikistoj kaj eĉ de la historiistoj kaj politiksciencistoj, kiuj okupiĝis pri la politikaj, ekonomiaj kaj sociaj strukturoj kaj evoluoj de la USSR, tiu disfalo estis neatendita.

Por politike interesitaj gecivitanoj, sed ĉefe por politikistoj, ĵurnalistoj, historiistoj kaj politikscienciscistoj la demando devis leviĝi pri la kaŭzoj de tiu drameca eventego. Sed tio okazis, laŭ mia tamen malkompleta kono, nur en tre malgranda mezuro. La plej multaj t.n. „sovetologoj”[2] tuj rapidis observi kaj analizi la tiel nomatan transformprocezon, la profundajn ekonomiajn, politikajn kaj sociajn ŝanĝojn. Ne malmultaj transprenis en la „nova Rusio” konsilajn kaj similajn funkciojn.

Mi ŝatus nun prezenti vicon da tezecaj konstatoj pri la historia fenomeno de la sovetia komunismo kaj ĝia evoluo. Kompreneble ĉe tio ne temas pri reproduktado de la kronologiaj sinsekvoj, kiu postulus multe pli da tempo ol estas je nia dispono. Anstataŭ tio, memoriĝu kelkaj el la plej gravaj politikaj, ekonomiaj, strukturaj kaj sociaj statoj kun konsidero pri ilia respekti-

---

2003, p. 195sj. La lasta granda libro de Conert „De la komerca kapitalo ĝis tutmondigo” estis dediĉita al historie kiel sisteme konceptita prezentado de la „Evoluo kaj kritiko de la kapitalisma ekonomio” (Münster 1998, 2-a prilab. eld. 2002). [Enkonduko kaj noto de la redaktejo de Z]

Ĉiuj supre cititaj titoloj kaj tekstoj en la germana. Ni reproduktas la supran noton kun ĉiuj detaloj, por du celoj: Unue por ke germanlingvaj legantoj povu aliri tiujn interesajn tekstojn; due ĉar ni ricevos eventuale indikojn de legantoj pri dezirinda Esperantigo de iuj el tiuj tekstoj, aŭ eĉ tradukojn faritajn de ili ... -vl

2 Okcidentaj esploristoj pri la sovetia sistemo. -vl

va graveco por la plua evoluado de la sovetia socio.

2.

Post la starigo de la soveta potenco en Ruslando per la Oktobra Revolucio de 1917 la demando estis pridisputata inter rusaj kaj ankaŭ okcidenteŭropaj socialistoj, ĉu tiu revolucia transpreno de la politika kaj socia potenco estis prava. „Prava" malpli en politika-morala senco ol en teoria kaj fakta, do ekz-e ekonomia kaj socia. En la socialistaj partioj orientitaj laŭ la teorio de Karlo Markso validis la tezo ke superado de la burĝa-kapitalisma socio kaj la starigo de socialisma devas baziĝi sur evoluinta nivelo de la sociaj produktadfortoj, sur moderna industrio kaj teĥnologio, sur ĝenerala klereco, alta kvalifikiteco, civiliziteco kaj kulturo. Ĉio ĉi ne estis donita en Ruslando, kaj Lenino kaj liaj kamaradoj ja sciis tion. Iuj pro tio kontraŭdiris la transprenon de la povo. Lenino pravigis tiun ĉefe per la argumentoj, ke la revolucio en Ruslando efiku kaj efikos kiel oriflamo por okcidenteŭropa leviĝo de la proletaro, kiu respondos al la menciitaj kondiĉoj, kaj, ke la sociaj, politikaj kaj ideologiaj kondiĉoj en Ruslando ne donas realisman, konstruivan, akcepteblan kaj daŭreman alternativon al la potenco de la bolŝevistoj. Penseblas nur, laŭ li, alternativo de diktatoreco de la plej reakciaj fortoj, kiu devus konduki al ĥaoso.

Post perdoriĉa kaj detrua interna milito 1918-1921, en kiu pluraj okcidentaj ŝtatoj intervenis favore al la kontraŭuloj de la bolŝevistoj, sed en kiu tiuj fine konservis la superregadon, la sovetia registaro starigis politikan kaj ekonomian ordon kies strukturajn konturojn konceptis Lenino jam en aprilo 1918 („La venontaj taskoj de la sovetpotenco"). Ke sub la donitaj kondiĉ-

oj la celata socio ne povis esti komunisma aŭ socialisma en la senco de Markso, pri tio Lenino kaj la plimulto de la gvidantaj bolŝevistoj konsciis. Ĉefa celo estis la postatingo de tiu socia disvolvado de la produktadforto kiu fine ebligos sociajn kondiĉojn. La celita kaj iel ankaŭ realigita socia bazstrukturo estis karakterizita politike per aŭtoritateca potencordo de la bolŝevistoj, terkulture per ĉefe individua etkampula mastrumado kiu devis evolui al kooperativa, kaj per ŝtata dispono kaj gvidado de la malmulta granda kaj mezgranda industrio ĉe allaso de individuaj etindustrio, metio kaj detalkomerco. Tiu tiel nomata „nova ekonomia politiko" estis ĝis 1927/28 sukcesa almenaŭ en tio ke la nivelo de la antaŭmilita produktado, kiu post la interna milito falis al triono kaj malpli, estis reatingita kaj parte superita. Post la morto de Lenino en la jaro 1924 en la partia gvidantaro okazis ŝanĝiĝantaj frakciiĝoj. La unue objektiva konflikto temis pri tio ĉu la politiko orientiĝu ĉefe al plirapidigo de la revolucio en Okcidenteŭropo (aŭ ankaŭ en Azio) aŭ al la ekonomia, socia kaj kultura disvolvado de la sovetsocio (slogano „socialismo en unu lando").

Fine de la dudekaj jaroj la plej alta sovetia pov-instanco, la gvidantaro de la KPdSU[3] troviĝis antaŭ jena problemo: La industria disvolvado, konsiderata absolute antaŭranga, estis ebligata ĉefe per la deprenoj de la agrokultura plusprodukto. Sed tiu estis nesufiĉa, sekve al la plej grandparte etkampula strukturo, kaj ĝi fariĝis pli kaj pli malgranda, ĉar la diferenco inter aĉetprezoj por la terkulturistoj kaj la komercaj vendoprezoj fariĝis tiom granda ke la terkulturistoj perdis la instigon vendi siajn produktojn al la ŝtato. En la partia gvidantaro elformiĝis - koncize dirite - ree du kontraŭaj ĉeffrontoj: solvo de la proble-

3 KPdSU: Komunista Partio de Sovetunio. -vl

mo per uzado de perfortaj rimedoj, do konfiskado de la rikoltoj kaj devigo formi terkulturajn kolektiventreprenojn aŭ per stimulado de la kamparanaj ekonomiaj interesoj per oferto de malmultekostaj komercaj produktaĵoj kaj per forta instigo al libervolaj etkampulaj kuniĝoj. Komence de la tridekaj jaroj la unua alternativo trudiĝis, simbolite de la nomo Stalino.

3.

En tiu kunteksto estiĝis la diktatoreca kaj despota stalinisma reĝimo. Kiel tio eblis? Tiun pravan demandon ne eblas respondi ĉi tie, ĉar la kaŭzoj estas tro kompleksaj, tro multecaj kaj tro implikitaj. Nur tiom: Multaj aŭtoroj asertas ke la despoteco de Stalino estis antaŭpreparita de la aŭtoritateca reĝimo en la dudekaj jaroj. Efektive jam tiutempe la „ordinaraj" sovetiaj gecivitanoj kiuj ne estis organizitaj en la partio aŭ ne tie en pli alta pozicio, estis ekskluditaj el efektiva politika partopreno. Sed la tradicia rusa altestimo de „fortmana regado" supozigas ke Stalino povintus, ankaŭ sen tiu antaŭa aŭtoritateca politika ordo, popolisme formi plimulton por si. Ĝenerale, ĉe la supreniro de Stalino, de lia politiko kaj de lia reĝimo kunefikis rusaj tradicioj, normoj kaj kondutmodeloj. Pri la sovetia regadformo, politiko kaj evoluo inter 1932 kaj 1953, do en la erao de „stalinismo", mi formulas jen kelkajn tezojn:

- La stalina diktatoreca-despota reĝimo estis tute ne antaŭdesegnita kaj neevitebla. Ĉe pluraj politikaj vojdecidoj eblis alternativoj. Tamen ankaŭ ne estas pura hazardo ke tiuj ne estis realigitaj.

- Laŭ politikaj-moralaj, etikaj, homhelpaj, raciaj kaj civilzaj

aŭ eĉ socialismaj kriterioj la stalina despota regadformo estas neniel pravigebla, prezentebla kiel negrava, relativigebla. Por mi tio validas senrezerve. Tamen la stalina epoko estas bilancenda ankaŭ laŭ kromaj kriterioj.

- La industriigo estis, nelaste koncerne la armiĝon de la lando, unua celo kaj pravigo de la politiko de la partigvidantaro. Sukcesoj tiukampe estis celebrataj ne nur en Sovetunio, ili estis agnoskataj ankaŭ eksterlande. Ili ne estas kontesteblaj, sed estas fakte relativigendaj. Antaŭ ĉio, la nekontesteblaj produktad-sukcesoj estis atingitaj per multe tro alta uzo de materialo kaj de laborforto kaj kun multe da fuŝprodukto kaj oftaj kvalitmankoj. Sed ĝuste tio estas la ekonomie decida indikilo. La sistemo de centra, direktiva, detalobseda planekonomio mezurata je kvantaj sukcesparametroj, kun tro granda orientiĝo al la peza industrio povas esti pravigebla por tiuj jaroj konsidere la multrilate deficitajn kondiĉojn. Estas vere ke fine de la tridekaj jaroj ia plibonigo de la materiaj kaj sociaj vivkondiĉoj de la laborantaj homoj sukcesis. La nekapablo de la partia gvidantaro *post* la morto de Stalino ŝanĝi ĝisfunde tiun produktadmanieron montriĝis kiel unu el la ĉefaj kaŭzoj de la pereo de la sovetsocio.

- La Stalin-erao, ĉefe la jaroj 1936-1939, estis la epoko de amasaj ekzekutoj, antaŭ ĉio de supozataj kaj eventualaj kontraŭuloj de la reĝimo, kaj de la starigo de giganta reto de laborkoncentrejoj, en kiuj la viroj kaj virinoj estis senditaj jam pro malgravaj deliktoj, laŭ senbazaj denuncoj aŭ eĉ arbitre. Tio estas ĝenerale konata. Multe malpli estas konsiderata ke la stalina teroro trafis ja multajn, sed tute ne ĉiujn. Pro la alta bezono je laborfortoj, antaŭ ĉio kvalifikitaj kaj de sciencistoj,

inĝenieroj, teĥnikistoj kaj funkciuloj de diversaj fakoj, multaj precipe junaj homoj vidis ŝancojn por sia kariero. La konstante reklamata kaj celebrata industriigo kaj modernigo kaŭzis ja entuziasmon, ree ĉefe ĉe junuloj. Tio validas ankaŭ por la junaj kamparanoj kiuj alfluis en la estiĝantajn urbojn kaj industricentrojn.[4]

- Sian plej grandan triumfon - kaj por multaj samtempe la pravigon - la stalinreĝimo trovis en la monstre perdoriĉe elbatalita venko super la hitlera Germanio. En plej malfacilaj kaj plej senhavaj militkondiĉoj sovetiaj soldatoj kaj oficiroj, sed ankaŭ laboristoj, inĝenieroj kaj teĥnikistoj faris grandajn farojn, ekz-e ĉe la malmuntado kaj restarigo de tutaj industrikompleksoj kiuj estis transigitaj en orientajn regionojn. Ili tiel atestis pri tio ke propra iniciato, kia ĝi estis postulata kaj nepra en la donitaj ofte ĥaosaj kondiĉoj, montris pli efikajn rezultojn ol desupraj ordonoj. La monstraj ŝarĝoj kaj suferoj kiujn batalantoj kaj civila loĝantaro devis elteni en tiu „Granda Patruja Milito", spite al la malhumana politika reĝimo firmigis la nacian kaj socian identecon de la sovetiaj homoj.

- Ke Stalino en rilato kun eksterlandaj ŝtatuloj super kiuj li ne havis potencon, ja kapablis intertrakti racie, tion atestas lia sinteno en la militaj konferencoj, precipe kun Churchill kaj Roosevelt, de Teherano ĝis Potsdamo. Multaj okcidentaj historiistoj kaj politiksciencistoj ne koncedas tion, ĉar ilia skalo estas la intereso de la potencoj al kiuj ili sentas sin apartenantaj. Ke diplomato devas ankaŭ kunpensi kaj konsideri la interes-

4 Garros, V.; Korenewskaja, N.; Lahusen, Th.: Das wahre Leben. Tagebücher aus der Stalinzeit [La vera vivo. Taglibroj el la Stalin-epoko], Berlino, 1998.

ojn de siaj kontraŭuloj, tio estis ŝajne forgesita jam post Bismarko. Se la okcidentaj potenculoj en la plej malfrue 1946 - 1947 ekanta „malvarma milito" denuncis la „ekspansiemon" de la USSR al Okcidenteŭropo, Stalino kaj multaj sovetiaj civitanoj vidis ke oni trompis ilin je la fruktoj de la venko. Sen la esperita okcidenta ekonomia helpo kaj kun konstanta premo sur la sovetia regantaro, la rekonstruado, ĉefe de la detruita industrio, estis atingita en relative mallonga tempo (proksimume 1949/1950). Post tio la ĝisnuna sovetia produktadmaniero tamen atingis siajn limojn. Kiomgrade Stalino konsciis tion - li verkis ĵus antaŭ sia morto la tekston „La ekonomiaj problemoj de la socialismo en la USSR" -, ne estas klare sciebla.

4.

Post la morto de Stalino en marto 1953 ene de la gvidantaro de la KPdSU komencis konkurado pri la pintaj pozicioj, el kiu N.S. Ĥruŝĉovo eliris venke. Li prezentis dum la 20-a kongreso (februaro 1956) en fermita seanco sensacian akuzon kontraŭ Stalino. Sed jam baldaŭ post la forpaso de Stalino oni ĉesigis la plej brutalajn formojn de perforta regado, de ekzekutado de supozataj aŭ asertitaj sed ne pruvitaj opoziciuloj kaj la oftajn kondamnojn al longjara koncentrejo laŭ suspekto aŭ pro malgravaj deliktoj. Pro pluraj amnestioj granda parto de la koncentrejuloj akiris sian liberecon. La politika reĝimo restis aŭtoritateca; sed arbitra kaj perforta regado fariĝis el regulo la escepto. Populariĝis la karakterizado de la Ĥruŝĉova periodo kiel „degelvetero", metaforo pruntita el romano.[5]

5 Temas pri romano de la verkisto Ilja Erenburg. - Rim. de Z.

Por la plej multaj socialistoj kaj ankaŭ por multaj komunistoj en Okcidenteŭropo Stalino estis la tombisto de la sovetkomunismo. Tion oni povas efektive vidi tiel ĉefe el morala kaj humana vidpunkto. Sed, laŭ mia tezo, la fazo de la stalina perfort-regado ne nepre ekskludis ke post ĝia fino trudiĝus evoluo al civilizitaj, jurŝtataj, humanecaj kaj eĉ iel socialismaj formoj de ŝtato, politiko, ekonomio kaj socio. Povas ŝajni paradokse, sed estas konfirmebla per argumentoj, ke la esencaj kondiĉoj de la erozio de la ŝtatsocialisma reĝimo estis kreitaj en la periodo post la morto de Stalino.

La ekonomia kaj socia politiko de la KPdSU en la preskaŭ tridekjara fazo de Ĥruŝĉovo kaj Breĵnevo estis stampita de du kontraŭaj teniĝ- kaj ag-manieroj de la potencorganoj samtempe: dogmismo kaj pragmatismo. Sed necesis realismo, kiu mankis multrilate. Abstrakte vidate, la parti- kaj ŝtat-estraro de Sovetio post Stalino kaj post la rekonstruado de la industrio staris antaŭ la decido sekvi memstaran evoluvojon de la ekonomia, ŝtata kaj socia ordo sen orientiĝo laŭ kaj dependeco de la kapitalismaj liberalaj socioj, kio estis, konsidere la naturriĉecon kaj la homajn eblecojn de la Unio estis principe realigebla, aŭ, male, orienti la propran evoluon laŭ la precipe ekonomiaj rezultoj de kapitalisma produktado. La sovetiaj potenculoj, sed ankaŭ la ekonomiaj fakuloj kaj praktikuloj evidente ne konsciis ke tiuj rezultoj difinitaj kiel mezurilo kondiĉas certajn instituciojn kaj metodojn de ekonomia agado, kiujn transpreni oni tamen ne intencis.

Bonaj ekonomiaj rezultoj en la dua duono de la 1950-aj jaroj delogis Ĥruŝĉovon defii Usonon al ekonomia konkurado. Jam meze de la sesdekaj jaroj la sovetia produktado de certaj

normaj produktaĵoj devis super la usonajn. Sed jam komence de tiu jardeko la kreskokvotoj malaltiĝis. Oni konceptis certajn ŝanĝojn de la ĝisnuna produktadmaniero kaj publikigis kaj diskutis kelkajn konceptojn (ekz-e E.G. Liberman). Oni decidis ampleksan ekonomian reformkoncepton nur post la elpotencigo de Ĥruŝĉovo, 1965. Ĝi orientis fakte en la ĝustan direkton kaj estis reklamita en la tipa kampanja maniero, sed ne realigita. Post malmultaj kaj timetaj provoj de aplikado ĝi estis silente entombigita. Kiel povis okazi tio? La respondo de la plej multaj okcidentaj "sovetologoj" estis, ke la dogmemuloj en la partipinto kaj la centra ŝtata burokrataro blokis la realigon de la ŝanĝoj. Miaopinie estis pli decide ke, kontraŭ la supozoj de la totalismo-teoriuloj la partio kaj la ŝtatpotenco jam ne kapablis kontroli kaj trudi la plenumadon de desupraj decidoj, se tiuj ne estis en la intereso de tiuj kiuj devis labori sub la novaj kondiĉoj, do ĉi tie: la direktoroj de la entreprenoj kaj la regionaj ekonomiaj instancoj.

La malforteco de produktado kaj ĉefe efikeco de la sovetia ekonomio ne estis superataj en la 1970-aj jaroj. En 1974 kaj 1979 oni faris novajn reformdecidojn, kies realigo estis eĉ ne provata. Intertempe oni trovis ian anstataŭon por la ne okazanta problemsolvo: kreskigo de la eksporto de nafto al ekonomioj kun malmola monsistemo. La tiel akiritaj enspezoj de eksterlanda mono ebligis la importadon de greno kaj de pinta produktadteĥniko, se tiu ne estis metita sub la okcidenta livermalpermeso. La sovetiaj eksportoj al Okcidento estis 1970-1975 je 26,9 miliardoj (mrd) da usonaj dolaroj, 1976-1980 je 78,4 kaj 1981-1985 je 120,0 mrd da usonaj dolaroj. La proporcio de la energiportantoj estis proksimume 70 elcento. La komerca bilanco estis en la tuta periodo deficita. Ne eblas ne mencii, ke la

problemoj de la sovetia ekonomio dum tiu tempo estis kaŭzita ankaŭ per tio ke la gvidantaro akceptis la defion de Usono pri vetarmado.

Ankaŭ nur tre koncize eblas nomi la socian-politikan procezon esencan en la donita kunteksto. Temas pri evoluoj en la socio, pri ŝanĝitaj modeloj de pensmaniero kaj sinteno en la tiel nomata „inteligencija" [intelektularo] kaj en la vasta loĝantaro. La breĵneva periodo, precipe ek de la 1970-aj jaroj, estis stampita de stranga miksaĵo el ideologia dogmismo, selekteca subpremo kaj libereca farlasemo. La propagandita membildo de la socio estis la tradicia sovetia, stampita de iom simpla marksismo kiu tamen inkludis egalecajn, socialajn, humanajn kaj partoprenigajn normojn. Tiun membildon kontraŭis la politika kaj socia realo alimaniere ol en la stalina epoko. Kompare kun tiu, la gecivitanoj havis pli grandajn informeblecojn kaj en la privata sfero ankaŭ kritikaj opiniesprimoj estas malmulte riskaj. Sed partopreno, partoprenigo ĉe sociaj, kulturaj, ekonomiaj aŭ eĉ politikaj decidoj ne ekzistis por la socia plimulto. Sekve al la sinteno de farlasemo, ne garantiita, sed ja ekzistanta, de subaj partiaj kaj ŝtataj instancoj, eblis multaj kondut- kaj ag-manieroj, de simple privatismaj ĝis krimemaj, kiuj estis formale ne toleritaj kaj oficiale ne ekzistantaj. Precipe en la pli juna generacio kaj en la intelektularo la kontraŭdiro inter idealoj, normoj kaj realo kaŭzis forturniĝo el agnosko de aŭtoritatoj, de la reĝimo kaj de la socialismaj promesoj. Almenaŭ en tiuj ĉi tavoloj konstateblis, male, konsiderinda alturniĝo al antaŭaj rusaj pensmanieroj, al mistikismo, skeptikismo, nihilismo, sed nelaste ankaŭ al la nunaj okcidentaj konceptoj ĝis la novliberalismo. Ne neglektinda parto de la juna generacio rifuzis sin al la reĝimo, ekz-e per la rifuzo transpreni respondecajn funkciojn aŭ

entute kontrakti regulan laborrilaton.

Aldoniĝis la erozio de la planekonomia produktadmaniero. Korupto, neoficialaj ekonomiaj rilatoj kaj etendiĝanta paralela ekonomio determinis pli kaj pli la ekonomiajn funkciadojn kontraŭe al la norme regulaj funkci-reguloj. Tio okazis fine ne ĉiam malprofite al la ekonomiaj rezultoj, sed sekve de tio, la kapablo de la ŝtataj instancoj direkti la ekonomian disvolvadon, trudi prioritatojn, fari kontrolojn ktp, ĉiam pli malgrandiĝis. La rigida ordonekonomio sub Stalino estis tiurilate pli efika. Ankaŭ la kvalifikado de sciencistoj, inĝenieroj kaj faklaboristoj estis evidente pli konsekvence kaj pli sukcese subtenata en la stalina periodo. Grandaj konstru- kaj industri-projektoj estis plenumataj sub Stalino plej ofte kun pli aŭ malpli gravaj mankoj, sed de sovetiaj arĥitektoj, sciencistoj, teĥnikistoj kaj laboristoj, kio nun okazis ĉiam pli malofte. Ĉar la petrol- kaj gas-eksportoj ebligis tion, oni taskis tiajn projektojn ĉiam pli ofte al eksterlandaj firmaoj, fine malprofite al propra esplorado, disvolvado kaj kvalifikado.

5.

La jaroj 1985 ĝis 1991 estas la lasta fazo de la ŝtatsocialisma reĝimo de la USSR. Tiujn jarojn simbolas la „miraklulo” M. Gorbaĉov kaj la slogano „perestrojko”. En aprilo 1985 Gorbaĉovo paŝis al la pinto de la KPdSU-estraro. Diligente li travojaĝis la landojn kaj propagandis „profundan reformon de ĉiuj kampoj de la socio sur socialisma bazo”, ĝuste tiun „perestrojkon” (transformadon). Evidente li ne havis koncepton pri la ŝanĝo de la ekonomia ordo (kvankam li foje komunikis ke li jam antaŭ sia nomumado kiel Unua Sekretario de la Centra Komita-

to (CK) de la KPdSU havis rondon de famaj ekonomikistoj kiel konsilistoj). Sed supozeble li kaj la rondo de liaj intimuloj havis planojn por politikaj kaj sociaj novigoj. Tiuj kondukis 1989-1990 fakte al disfalo de la ĝis tiam plej forta vertebraro de la sovetia socio, la KPdSU. Jarojn post sia eksigo fare de Jelcin Gorbaĉov asertis publike plurfoje ke li dekomence volis la finan rezulton de la „perestrojko", la finon de la sovetia ŝtatscocialismo. Mi pridubas tion, sed hodiaŭ tio jam ne ludas rolon.

Inter 1986 kaj 1989, do dum nur kvar jaroj, oni decidis sub la partia gvidado de Gorbaĉov almenaŭ kvin el la laŭcele profundaj novigoj. Du da ili restis fakte senefikaj, jam pro tio ke oni apenaŭ provis realigi ilin. Ili estis komplete netaŭga, burokrat-institucia projekto de ekonomia reformo kaj saĝa, sed ĝuste ne realigita provo fortigi la entreprenan kundecidadon de la laborantoj. La tri ceteraj novigoj estis ekstreme efikaj koncerne la finan rezulton de la „perestrojko". Ili estis la sub la slogano „glasnost" (publikeco) mire rapide realigita gazetara kaj opinia libereco, la sub la nocio „nova pensado" farita ŝanĝo en la ekstera politiko, ĉefe kun la intenco ricevi kontraŭpartojn por pli fortan konsideron de la interesoj kaj postuloj de la okcidentaj aliancanoj, kaj la parlamentigo de la tradiciaj ŝtataj sovetiaj strukturoj.

Kiel klarigeblas la kiom ajn dubindaj „sukcesoj" de tiuj tri radikalaj ŝanĝoj, se konsideri la konatan malsukceson de la ekonomiaj reformoj de Ĥruŝĉovo en la kvindekaj ĝis Andropovo en la frua okdekaj jaroj? Mallonge dirite, per tio ke la supre deciditaj ekonomiaj reformoj ne estis en la intereso de la mezaj kaj malsuperaj instancoj kiuj devintus realigi ilin, do de la regi-

ona ekonomia administracio kaj de la entreprenĉefoj. Sed tiu situacio ne troviĝis ĉe la tri „perestrojko”-disponoj. Ĉefe ĉe „glasnost”, sed baldaŭ ankaŭ plej ofte ĉe la transformado de la politika sistemo la koncernataj agantoj havis fortan intereson realigi ilin.

La okcidenta publika opinio akceptis la „perestrojkon” kun vera entuziasmo kaj oni notis kun nekompreno ke ĝi renkontis ĉe la vasta loĝantaro de la USSR skeptikecon, indiferenton kaj rifuzon. La kaŭzoj de tio kuŝas ĝuste en la antaŭe de mi koncize nomitaj evoluoj en la 70-aj jaroj: La tre disvastiĝinta individua kaj ankaŭ kolektiva pritraktado de la abismo inter sociaj normoj, postuloj, promesoj kaj la la alispeca realo perceptata kiel neŝanĝebla. La silenta distanciĝo de socialismaj idealoj, de la espero je ŝancoj por politika kaj socia partopreno, je pli da garantiitaj liberecoj kaj je pli alta materia vivnivelo; la emo je socia indiferento, mistiko, obskuraj instruoj kaj okcidenta pensado, kiujn oni antaŭ Gorbaĉovo rajtis nur pensi, oni rajtis nun eldiri kaj eĉ propagandi. Tion oni uzis en miriga mezuro kaj la emo je liberalismo kaj merkatekonomio, kiu ĝis tiam estis limigita ĉefe al la tavolo de la intelektularo, estis nun efike popularigita.

Tute koncize resumeblas: En la sovetia potencelito de Lenino ĝis Gorbaĉovo, nur ĝis komence de la tridekaj jaroj ekzistis nombro da gravaj personoj kun aŭtenta kompreno de la teorio kaj de la ŝtat-, ekonomi- kaj soci-kritiko de Markso kaj Engelso. En la postaj fazoj ili estis ne nur malpli, sed ili ĝenerale ankaŭ ne apartenis al la pli altaj ŝtupoj de la potenc-hierarĥio. Unu el la sekvoj de tio estis, ke en la USSR de Ĥruŝĉovo ĝis Gorbaĉovo ne ekzistis koncepto pri reformo de ŝtato, de ekon-

omio kaj de socio kiu estus orientita, trans aŭtoritateca ŝtatsocialismo, burĝa-liberala socio kaj kapitalisma ekonomio, al la humanaj kaj emancipaj celoj kiuj troviĝas precipe ĉe Markso, kvankam ofte nur implicite kaj nerekte formulitaj: ekonomia agadmaniero kies pelforto kaj celo estas la kontentigo de la socie kaj racie difinitaj sociaj kaj individuaj bezonoj; memdeterminado de la sociaj subjektoj, de la individuoj kaj de la kolektivoj; uzado de la potencfunkcioj sub konstanta kontrolado, tempe limigita kaj revokebla; libera disvolviĝo de la individueco sen antaŭrajtoj koncerne aliajn personojn aŭ grupojn; amplekse partoprenigaj sociaj kaj politikaj rilatoj surbaze de raciaj argumentoj, saĝaj interesoj kaj decidoj. Oni povus kritiki tiun konstaton ke ĝi ofendas kernan punkton de la teorio de la historia materiismo, per tio ke ĝi dependigas socian evoluon de la subjektiva faktoro de la kapabloj de la sociaj agantoj. Sed tiu faktoro povas esti en certaj sociaj kaj politikaj situacioj esti alte efika, tamen ĝia elformiĝo dependas de kondiĉoj kiuj estas komprenataj kiel „objektivaj”, kiel ekz-e la nivelo de la materiaj kaj de la personaj produktadfortoj, de la nivelo de la sociaj konoj kaj kapabloj, de la kultura kaj civilizacia nivelo kaj simile pli.

Robert Steigerwald: Socialismo kaj ŝtato - dek tezoj

1. Ĉar la kapitalisma reproduktad-procezo ĉiam denove reproduktas la kapitalrilaton, ĉar do ne povas finiĝi la kapitalismo el siaj enaj procezoj, ne povas aŭtomate enkreski en socialismon aŭ disfali, restas kiel sola vojo el la kapitalismo la revolucio; ĉe tio estas nenio dirita pri la maniero en kiu okazos tiu revolucio. Kiu neas tion, tiu povas esti ĉio ebla, sed tiam li ne estas marksisto. En la klasikaj teori-konceptoj estas ellaborite: Tiu revolucio devas konduki al anstataŭigo de la kapitalisma ŝtato - tiu diktatoreco de la burĝaro - per la socialisma ŝtato - la diktatoreco de la proletaro. Pri tio ekzistas teoriaj pozicioj kaj intertempe jardekojn longa sperto. Ambaŭ devas enflui en la diskuton se ni volas lerni el la eraroj de la dogmismo aŭ de la pragmatismo.

Estas do kontrolendaj la teoriaj eldiroj de la marksismaj klasikuloj pri la diktatoreco de la proletaro kaj la multaj jaroj da sperto en klopodado por socialismo.

Pri tiuj demandoj fariĝis jam prelegoj dum la tri Leverkuzaj Dialogoj, sed tiu materialo estas ĝis nun ne uzita.[1]

La ŝtatteorio de la marksismo eliras el la konstato ke en la klasa socio unu klaso praktikas la povon, por sekurigi sian proprieton. En la famaj laboraĵoj de Markso pri la Pariza Komunumo[2], la demando pri proprieto ne estis elvokita, ĉar estis nenio

1 *Leverkusener Dialog.* Ĝenerala temo: Marksismo kaj ŝtato, 15-a - 16-a de julio 2006. La prelegoj mendeblas (en la germana) ĉe Neue Impulse Verlag, Hoffnungstraße 18, DE-45127 Essen.

2 En Esperanto: Karlo Markso: La interna milito en Francio (1871) (La Pariza Komunumo), kun enkonduko de Frederiko Engelso, tradukis Vil-

korektenda en la orientiĝoj de la „Manifesto de la Komunista Partio”[3] pri tiu demando. Kun tio, Markso pritaksis la Parizan Komunumon kiel unuan diktatorecon de la proletaro, kiel ŝaton, kiu estas interŝtupo survoje al forigo de la klasoj, de la klasbatalo kaj de la ŝtato. La plej gravaj trajtoj sur tiu interŝtupo estas: forigo de la burokrateco kaj de la „staranta” armeo, kiun anstataŭu la armita popolo. Forigo de ĉiaj privilegioj de la delegitoj kaj administrantoj, kies salajroj estu sur la nivelo de la laboristaj salajroj. Elekteblo kaj ĉiumomenta revokeblo de la delegitoj fare de iliaj elektantoj. Anstataŭigo de la parlamenta sistemo per la komunumo kiel decidanta, kontrolanta kaj laboranta estaĵo, do nuligo de la [tripartigo de la potencoj].

2. La Pariza Komunumo, sur kies analizo baziĝas tiu ĉi ŝatkoncepto de Markso, ekestis en eksterordinaraj cirkonstancoj. Ankaŭ la Oktobra Revolucio okazis en tute eksterordinaraj cirkonstancoj. Unue Lenino estis konvinkita ke oni devas krei ŝaton de la speco de la Pariza Komunumo. Ĝi devas baziĝi sur la rekta povo de la armitaj kaj organizitaj laboristoj. Polico, armeo, ŝatoficistoj estas forigendaj. Ĉiuj oficistoj estas elektendaj kaj ĉiumomente revokeblaj. Ilia salajro estu laŭ la averaĝa bona laboristsalajro. Krome temas pri la ŝatigo de la grundo, pri kunfandado de la bankoj al nacia banko, pri kontrolado de la tuta produktado. Lenino sisteme disvolvis tiun koncepton en sia libro „Ŝtato kaj revolucio”.

La reala historio trudis al Lenino rapidajn korektojn ĉe tiu

helmo Lutermano, Mondial, Novjorko, 2005. ISBN 1-59569-025-5

3 Karl Marx kaj Friedrich Engels: Manifesto de la Komunista Partio, Esperanta traduko kaj postparolo de Detlev Blanke, eLibro, Aranĝis: Franko Luin, ISBN 91-7303-142-9, http://www.omnibus.se/inko

koncepto.[4] Kelkaj de tiuj korektoj kompreneblas ankaŭ per uzo de la „Kritiko de la Gotaa Programo”[5] kiun Markso verkis en 1875. Pozicioj de tiu kritiko de la jaro 1875 videblis ian distanciĝon disde la analizoj de 1871[6]. Jam la distingo de du fazoj de la komunisma socio montras tion. En la unua, la socialisma fazo, ankoraŭ ekzistas „denaskaj makuloj” de la kapitalismo, la ideoj pri justeco ankoraŭ ne estas socialismaj. La efikecsistemo de la distribuado, pro la nekontestebla distingo de simpla kaj kunmetita, de simpla kaj komplika laboro, ne kongruas kun ĝenerala fiksado de la salajro ĉe ia limo. Kiam Buĥarino postulis, ke homojn, kiuj gajnas 4.000 rublojn, oni mortpafu, Lenino respondis: Tiajn homojn oni serĉu (ĉar oni bezonas ilin). Dum la koncepto de 1871 baziĝis sur la ideo ke la Komunumo jam ne estas ŝtato en la malnova senco, en la programkritiko de 1875 estas koncedite ke en la unua fazo ankoraŭ ekzistas burĝa juro. Tio signifis nepre la ekziston de instrumentoj por certigi tiun juron. Krome, la revolucio mem trudis - oni pensu pri la problemoj de la interna milito kaj de la interveno kiel kaŭzoj - neantaŭviditajn demandojn de la potenco: starigo de armeo anstataŭ de milico, fera centrigo kaj disciplinigo de ĉiaj ekonomiaj, de ĉiaj sociaj kampoj kun tuta akreco. Tio ne kongruis kun liberecaj-demokratiaj atendoj. „Devojiĝoj de la principoj de la Pariza Komunumo” estis nekontesteblaj.

4 Vd la prelegon de Uwe-Jens Heuer en la 3-a Leverkuza Dialogo pri la temo: La koncepto de la Pariza Komunumo kaj la spertoj de la reala socialismo.

5 En Esperanto: Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso kaj la letero al Bracke, tradukita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, ISBN 978-2-918300-03-8

6 Pri la Pariza Komunumo.

3. Ĉu la historio konfirmis la ideon ke post la venka revolucio rapide okazas la malkonstruo de la ŝtato? Ke okazos formiĝo de ne proprasenca ŝtato? Tio okazis en neniu el la socialismaj landoj. Problemoj kiuj rilatas kun la scienca-teĥnika revolucio, kun la gigantaj materialaj kaj intelektaj produktofortoj, kiujn ĝi kreas, krome la rilato de ekonomio kaj ekologio ĝuste ankaŭ estonte ne reguligeblas sen iaj normoj kaj ties kontrolado - kaj tio devos esti organoj ankaŭ de devigo, egale ĉu oni nomas ilin ŝtato aŭ alie.

4. Ni ĉiuj scias, ke en Sovetunio, ne nur tie, okazis gravaj krimoj. Ni devas ĝisfunde okupiĝi pri tio, kio ebligis tiajn ekscesojn, kiaj sistemoj eblus por sekurigi kontraŭ tio. Jen ni ne povas eviti la demandon de la ŝtato, kiel pensi pri la konstruo de estonta socialisma ŝtatpotenco. Do, temas pri seriozaj instruoj el nia historio.

Mi estas konvinkita pri tio ke unu el la kondiĉoj kiuj ebligis krimojn estis la rezigno pri tripartigo en granda lando kun neevitebla hierarĥiiĝo de la sovetsistemo. Se en la soveto ekzistas la unueco de la potencoj, se do la leĝfara, plenuma kaj jura potenco troviĝas en la mano de la sama kolektivo (en la kazo de Stalino eĉ en tiu de unusola homo!), tiam aŭtoritateca ŝtatstrukturo kaj arbitra regado fariĝas „normalaj"! Por kontraŭstari tion, necesas strikta obeo al la socialismaj leĝoj, starigo de tiurilataj kontrolsistemoj (eble per starigo de konstitucia tribunalo devigata plenumi la socialisman konstitucion, per administracia jursistemo - tiel ke unuopuloj kaj kolektivoj havu la rajton kaj eblecon prijuĝigi jurajn kaj politikajn decidojn). Devas ekzisti garantioj kontraŭ arbitrecaj agoj kiaj okazis per enmiksiĝo de la politika gvidantaro en leĝajn kaj jurajn kampojn kaj kiuj eb-

ligis la teror-disponojn. Tio signifas disigon de la potencoj, de la leĝdona, plenuma kaj jura, de socialisma ŝtato.

Oni kontraŭmetas, ke tio estas pruntoj el burĝaj ŝtatkoncept-oj. Unue oni uzas ĉi tie „burĝa" same kiel mortbatan argument-on kiel - por elekti alian ekzemplon - la vorton „stalinismo". Se oni jam klasis ion kiel „burĝa" aŭ „stalinisma", tiam jam ne necesas plua esplorado. Due, la detruo de la potencdisigo en la faŝismo servis ĝuste por terorigi la laboristan klason, do potencdisigo havas sencon por la laborista klaso eĉ en la burĝa ŝtato. Kion do diras la mortbata argumento, ke tio estas burĝa? Ĉio burĝa prijuĝendas depende de konkretaj sociaj kondiĉoj, sed ne en si mem!

5. En la medio de la DKP[7] ekzistas la zorgo ke oni deglitos en reviziismon se oni konsideras en la socialisma ŝtato potencdisigon necesa. Unue, ĉe tio oni ofte konfuzas potencdisigon kun potencdivido. La divido (!) de la potenco inter diversaj klasoj okazas, se entute, nur en tre maloftaj konfliktsituacioj. Normale estas, ke klaso troviĝanta en la povo ne dividas tiun potencon kun alia klaso. Se klaso troviĝante en opozicio tamen parolas pri potencdivido, kiel faris ekzemple la frua burĝaro strebanta al povo en la 18-a jarcento en Francio, tiam ĉar ĝi ankoraŭ ne kapablis perbatali al si la tutan povon. En esceptaj situacioj, tiel en la tempo inter februaro kaj oktobro 1917, ekzistis en Ruslando du diversaj klaspotencoj kaj en tiu senco „divido" de la potenco: La provizora-revolucia registaro estis tiu de la burĝaro, la armitaj soldat- kaj laborist-konsilantaroj [la sovetoj] ĝermoj de proleta klasdiktatoreco. Tiu nenormala stato estis ĉesigita en oktobro.

7 Germana Komunista Partio (*Deutsche Komunistische Partei*).

Alie statas la demando pri potencdisigo, do de disigo de la leĝdona, plenuma kaj jura potenco de unusola klaso troviĝanta en la povo. La klaseco de ŝtato, de diktatoreco, rezultiĝas el tio, al kiu apartenas la pan- kaj vivo-fontoj, decidaj por la vivo de popolo, la produktadrimedoj, sed ne el tio ĉu ekzistas aŭ ne en ĝi potencdisigo. Tiu estas instrumento uzata aŭ ne por plenumado de la klasdiktatoreco. Ĝia signifo rezultiĝas el la demando, de kiu ĝi estas „aldonaĵo", ĉu de la burĝa aŭ de la proleta ŝtatpotenco, ĉu surbaze de kapitalisma aŭ de socialisma proprieto je produktadrimedoj. Burĝa klasdiktatoreco kun potencdisigo rezultigas burĝan demokration (egale kiom bona aŭ malbona ĝi estas en tio). Burĝa klasdiktatoreco sen potencdisigo estas aŭtoritateca aŭ faŝisma diktatoreco. Faŝismo kaj Vajmara Respubliko[8] estis rilate potencdisigon diversaj, sed en ambaŭ kazoj temas pri burĝa, kapitalisma ŝtato, pri diktatoreco de la burĝaro.

Se en socialisma ŝtato ne ekzistas potencdisigo, ĝi estas tamen socialisma ŝtato, ĉar en ĝi la pan- kaj vivo-fontoj de la popolo jam ne estas kapitalisma proprieto kaj sekve la socie perlaborata plusprodukto estas alproprigata ne private, sed socie. Per tio jam principe estas malhelpataj eblecoj kiuj estas kutimaj en ĉiu kapitalisma ŝtato kun aŭ sen potencdisigo, ekzemple la premgrup-agado kun sia korupto. Aliaj formoj de korupto eviteblas certe nur per strikta kontrolado en produktado, distribuado kaj socia politiko. Sole jam tio montras la gravecon de la propriet-demando ankaŭ ĉe la temo de potencdisigo. Tio igas la temon de potencdisigo ne flanka afero, ĉar sen ĝi ekzistas la danĝero ke la popola proprieto transformiĝas en

8 La germana ŝtato post la novembra revolucio de 1918-1919 ĝis la ekrego de la faŝismo en januaro 1933.

puran ŝtatproprieton - kun la la ebleco de fremdigo de la amasoj de tiu proprieto. La sekvojn ni spertis.

6. En la DKP ni havas ian „potencdisigon". La kongreso aŭ la estraro, tio estas la „leĝdona potenco". La prezidejo aŭ sekretariejo la „plenuma", kaj la Centra Arbitraci-Komisiono, speciale elektita de la kongreso (do, ĝi estas dotita je suvereneco!), estas la „jura potenco". Ankaŭ tio estas por antaŭmalhelpi eblajn arbitrajn decidojn de partigvidantoj. Kaj en la partio same kiel ankaŭ en (socialisma) ŝtato devas ekzisti „domregularo", konstitucio aŭ statuto al kiu devas esti ligitaj la agoj de la diversaj potencoj. Tio rilatas kun burĝa demokratio nur en tio, ke necesis historio, ankaŭ tiu de la burĝa socio, por ke la agontoj en tiuj kampoj komprenu, ke tiaj instituciaj sekuriloj necesas - sendepende de la klaseco - se oni volas eviti aferojn kiuj encerbiĝis al la homoj en suferigaj historiaj procezoj.

7. Estas pripensinde, ke nova impeto al socialismo ĉe ni eblas verŝajne nur, se plej larĝaj amasoj de la popolo faras tiun impeton. Tia popola movado estos socie, politike kaj ideologie ne unueca. Sed tio havus konsekvencojn por ŝtatpotenco kiu rezultiĝus el tia movado. Eblas koaliciaj registaroj kaj politikaj-parlamentaj frakcioj. Tio estus ŝtata tipo de demokratia respubliko. Ĉu tiu estus identa kun la ŝtattipo de demokratia respubliko proponita de Engelso 1891 ĉe la Skizo por la Erfurta Programo?

Engelso komparis por tio la tiaman ŝtatan staton de Francio, Usono, Anglio: „*Oni povas imagi ke la malnova socio povas pace enkreski en la novan, en landoj kie la popolreprezentejo koncentras en si ĉian povon kaj kie oni povas konstitucie fari kion oni volas ekde kiam oni havas la plimulton de la popolo*

kun si; en demokratiaj respublikoj kiel Francio kaj Usono, en monarĥioj kiel en Anglio, kie la estonta deaĉeto de la monarĥio estas ĉiutage diskutata en la gazetaro kaj kie tiu dinastio sen la popola volo estas senpova."[9] Do, laŭ pritakso de Engelso, en tiuj ŝtatoj la politika potenco estis koncentrita en la popola reprezentejo. *„Koncentriĝo de ĉia politika povo en la manoj de la popol-reprezentejo"*.[10] Tio igas la parlamenton komparebla kun la Pariza Komunumo, en kies manoj ĉia povo estis koncentrita. Pro tio, Engelso povis kompreni tiun ŝtattipon de demokratia respubliko kiel eblan formon por la diktatoreco de la proletaro: *„... ke nia partio kaj la laborista klaso povas atingi la potencon nur en formo de la demokratia respubliko. Tiu estas eĉ la specifa formo por la diktatoreco de la proletaro."*[11]

Mi aldonu ke mi supozas, ke Engelso rilate la nomitajn demokratiajn respublikojn estus hodiaŭ pli skeptika, ĉar en ties parlamentoj la politika potenco tutcerte ne estis koncentrita.

La ŝtattipo de la demokratia respubliko, kia ĝi rezultiĝus el larĝa popolmovado kiel supre prezentita, ne estus tia por tuja transiro al socialismo, sed ia intera stadio. Se kompari ĝin, ĝi plej similus al la konceptoj de la Nova Demokratio, de la Popoldemokratio, de la kontraŭfaŝisma demokratio, kiel ili estiĝis sekve al la 7-a Mondkongreso de la Kominterno. La falsado de tiuj konceptoj fare de la reala politiko esplorendas en la intere-

9 *Karl Marx; Friedrich Engels: Zu den sozialdemokratischen Programmentwürfen von Gotha und Erfurt* [Karlo Markso; Frederiko Engelso: Pri la socialdemokratiaj programproponoj de Gotao kaj Erfurto], *Neue Impluse Verlag*, Eseno, p. 50s.

10 Saml., p. 52.

11 Saml., p. 51.

so de la estonta evoluo. Miaopinie tiu falsado okazis pro la provo transsalti tiun interan stadion kun konservo de la nomado de la ŝtato kiel Nova Demokratio ktp kaj konstrui socialisman ŝtaton. Pri la eraroj krome faritaj ĉe tio necesas aparta esplorado.

El la menciitaj evoluoj devus rezulti konsekvencoj rilate la karakteron de la partio, la rilaton inter partio kaj amasoj, partio kaj ŝtato, rolo kaj signifo de la sindikatoj kaj de aliaj sociaj institucioj.

8. Al la traktado de la ŝtatdemando, do de la politika flanko de la potencdemando, apartenas, ĝuste ankaŭ antaŭ la fono de la faritaj spertoj, samrange la diskuto pri la civilaj sociaj kampoj. Temas pri la demando: Kiel la socialismo povas fariĝi socio, al kies formado la plej granda parto de la homoj dediĉas sian forton, tiel ke ili spertas sin kiel iniciatantoj, formantoj kaj ne kiel „protektataj" objektoj de aliies decidoj kaj agoj. Gravaj komencoj en tiu kampoj apartenis al la fortoj de la unua impeto en la Germana Demokratia Respubliko, kaj unu el ties grandaj malfortoj estis la fakto ke tiuj komencoj ne estis plu disvolvataj aŭ almenaŭ konsekvence konservataj sed neglektataj aŭ malestimataj. Tiaj pozitivaj komencoj estis formoj de rekta demokratio, inkluzive de la antaŭŝtataj, antaŭjuraj elementoj en formo de laboristaj aŭ civitanaj komitatoj, kiuj klopodis loke kaj regione por solvoj (kiuj ja havas tie sian lokon kaj ne en la decidokompetento de distrikto, de regiono, de registaro), en formo de laboristaj kaj kamparanaj inspektistoj aŭ similaj organiz-formoj (socia kontrolado), arbitraci- respektive konflikt-komisionoj kaj similaj (antaŭjura konfliktsolvado). Socialisma ŝtato vivos nur, se la potencdisigo estas strikte obeata kaj ankaŭ la demokratia bazo de tiu ŝtato estas konstante novigata.

9. Ĉu konsilantaroj havus apartan lokon en tia sistemo? Ili unue estiĝis en Peterburgo kiel klasaj organoj de la proletaro kiu ne havis voĉdonrajton, ne disponis pri sindikato, kaj tio estis konsilantaroj por reprezenti la tutan proletaron de entrepreno sen distingo de branĉoj aŭ de aliaj entreprenaj aŭ produktaj dividoj. En tiu rilato ili unue fariĝis anstataŭantoj de sindikato kaj elektoasocio, kaj nur poste fariĝis organizaĵoj kaj portantoj de la proleta ŝtatpotenco. Ĉu ili povas plenumi funkcion en la celata demokratia respubliko? Kiel antaŭŝtupoj, kiel ĉarniro de la laborista bazo kun la sociaj organizaĵoj kiel sindikato, partioj, ŝtataparato, do kiel bazdemokratia korektilo kaj efika strukturo de reprezentado de la materialaj interesoj de la laborista klaso ĉe la neeviteble centre konstruitaj sociaj, ŝtataj organizaĵoj kaj organoj, kiel bazdemokratia kontraŭpezo kontraŭ tro pova centrismo (ekzemple en Ĉinio). Ekzistus apud ili kaj krom ili ankaŭ aliaj tiaj bazaj organoj, ekzemple civitanaj iniciatoj kiuj estiĝas sponte kaj alstrebas certan konkretan celon.

10. Tiu koncepto ne distingiĝas de la konsilantarsistemo, se ĉia politika povo estas koncentrita en la manoj de la popola rezprezentejo. Sed la ŝtatoj cititaj de Engelso kiel ekzemploj havas ĉiuj, krom la koncentriĝon de ĉia politika povo en la manoj de la popolreprezentejo, juran ordon disan de ĝi, kiu ja ricevas sian aŭtoritaton per la popolreprezentejo, sed ne estas simple identa kun ĝi. Pro tio, alie ol en la komenca koncepto de la konsilantaroj, la disigo de la potencoj ne estas simple forigita. Sed se la tripartigo de la potencoj estas forigita, se konsilantaroj estas samtempe decidaj kaj plenumaj organoj, estiĝas problemoj tiam kiam necesas starigi konsilantarojn en pli granda teritorio. Tio ne eblas sen hierarĥia ordo. Sen potencdisigo

aperas la danĝero (kaj ĝi ja aperis!), ke superordaj sistemoj kiel superordaj enmiksiĝas en la konsilantarojn de la pli malsuperaj ebenoj kaj ke per tio la konsilantarsistemo estas elŝaltita per tio ke nun la pli malsupera konsilantaro jam ne decidas kaj plenumas per propra „kompetento". En ekstrema okazo kuŝas en tio la danĝero de estiĝo de aŭtoritateca potenco. Do, necesas potencdisigo, certigo de trairanta jursistemo kiu fiksas la ŝtatajn, la kolektivajn kaj la individuajn rajtojn kaj garantias ties obeadon; tio siavice necesigas la starigon de administra jursistemo.

Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano el: Robert Steigerwald: Sozialismus und Staat (Thesen), en: Marxistische Blätter 6/07, p. 49-53

Monda Asembleo Socia (MAS) …

… estas asocio fondita en la jaro 2005 de Esperantistoj kiuj, inspiritaj de la artikoloj de la gazeto (reta, laŭokaze papera) *Le Monde diplomatique en Esperanto* (*http://eo.mondediplo.com)* volas ne nur legi, sed ankaŭ diskuti kaj agi.

Ĝi estas strikte bazdemokratia, travidebla (por siaj membroj), progresema organizaĵo, kiu funkcias nur pere de retpoŝto kaj Interreto. Ĝi partoprenas en la Mondaj kaj laŭeble regionaj Sociaj Forumoj kaj referencas en sia statuto por sia agado la tekstojn kunigitajn en la sekvapaĝe listigita libro „Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj …". Aliĝo kaj membreco estas senpagaj.

Ĝia retejo: http://mas-eo.org enhavas ĉiujn interesajn informojn pri MAS, kaj krome multajn legindajn artikolojn, tradukitajn aŭ memverkitajn de la membroj.

Ĉiu membro rajtas ne nur publikigi en la retpaĝo de MAS siajn tekstojn, sed ankaŭ publikigi librojn en la eldonejo de MAS, kondiĉe ke li havas aŭ trovas la rimedojn por presado (ĉar aliĝo kaj membreco estas senpagaj, MAS ĝenerale ne disponas pri la rimedoj pagi al verkemuloj la eldonadon de libroj).

Tamen, ĝis nun eldoniĝis jam pluraj libroj (apervice):

- **C. F. Ramuz: Aline** (novelo de la franclingva svisa aŭtoro en traduko de nia fama René de Saussure, reeldonita post la unua eldono en 1911), 2007

- **Arturo Ŝniclo: Rondo (Dek dialogoj); La fianĉino (Skizo), kun eseo pri verkoj de Ŝniclo de Hartmut Scheible**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2007

- **Karlo Markso: Salajro, prezo kaj profito** (prelego pri bazaj ekonomiaj fenomenoj antaŭ internaciaj delegitoj de la laborista movado), trad. de Vilhelmo Lutermano, 2007

- **Kubaj infanrakontoj**, trad. de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kun ilustraĵoj de Danny Daniel Pereyra, 2007

- **GBEGLO Koffi: Esperantujismo**, 2008

- **Johano Besada: Eseoj**, 2008

- **Karlo Markso: Nerefuteblaj citaĵoj**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2008

- **Fidel Castro Ruz: Dialogo de civilizacioj** (2 paroladoj), trad. de Amparado Cisnero, 2009

- **Dominique Vidal: Kiel Israelo elpelis la palestinanojn**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

- **Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, Universala Deklaro de Homrajtoj, Konsilantaro pri Homrajtoj, Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, Internacia Traktatoj pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, Konvencio pri la Rajtoj de la Infano, Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj, Protokolo pri abolo de mortpuno, Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj** - trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

- **Karlo Markso: Dunglaboro kaj kapitalo**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

- **Karlo Markso: Pri liberkomerco, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso,** trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

- **Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso,** trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

- **Eddy Raats: La longa vojaĝo. Travivaĵoj de etulo**, 2009

- **Dania Rodríguez García: Ni interŝanĝu; La nova leterportistino; Du kaj la fantazio. Tri infanteatraĵoj.** Elhispanigitaj de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kaj Vilhelmo Lutermano, 2009.

- **Kien Ĉinio? Dek-du analizoj el diversaj landoj kaj vidpunktoj**, 2009

- **Oktobra Revolucio kaj la sekvoj - Moshe Lewin: La Oktobra Revolucio rezistas al la historio; Hansgeorg Conert: Bazoj kaj evoluo de la sovetsoci; Robert Steigerwald: Socialismo kaj ŝtato - dek tezoj,** 2009 (tiu ĉi libreto)

La libroj de MAS akireblas ĉe la kutimaj librovendejoj en Esperantujo, precipe ĉe tiuj de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de la Flandra Esperanto-Ligo (FEL).

Enpaĝigita de la Monda Asembleo Socia (MAS) -vl
per OpenOffice 3.0.0
kaj litertiparo Liberation Serif (12 pt)
sub Mandriva-Linukso 2009
en Pedro Betancourt, Kubo,
en junio 2009

Presita en Germanio 2009

ISBN 978-2-918300-07-6